NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
esperantobi@gmail.com
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 20 ∈. Speciala: 15 ∈. Familia: 35 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

MAJO/OKTOBRO 2009 **Nro. 79 (3/09)**



Gdansk (germane, Danzig), 02/08/2009

Iciar Arteche kaj Jesús M. García, du el la tri bilbaoanoj partoprenantaj la UK de Bjalistoko (Pollando), pozas, postkongrese, apud Probal Dasgupta, Prezidanto de UEA; John Wells, Prezidanto de la Akademio de Esperanto; kaj Jarek Parzyszek, Prezidanto de Fondaĵo Zamenhof (Bjalistoko) kaj elstara membro de la LKK de la UK.



La tri bilbaoanoj partoprenantaj la 68-an Hispanan Kongreson, en Malago (Iciar Arteche, José L. Bringas kaj Jesús M. García), apud la veterana esperantisto Luis Serrano, el Sabadell.

CUOTAS DEL AÑO 2009.

Hace meses que se hizo el cobro de las cuotas del año 2009 a aquellos socios que las tienen domiciliadas a través de un banco o caja de ahorros. A los demás, os recordamos que, cuanto antes hagáis el pago, el primer beneficiado será nuestro Grupo. Las cuotas vigentes, iguales que las del año 2008, son:

Cuota normal:	20,00 euros anuales.
Cuota reducida:	15,00 euros anuales.
Cuota familiar:	35,00 euros anuales.

NE FORGESU (KAJ UZU !) LA RET-ADRESON DE NIA E-GRUPO :

esperantobi@gmail.com

Ni regule rigardas ĝian enhavon. Tamen, se ni ne tuj respondus, ne maltrankviliĝu : ni ne estas profesiuloj, kiuj daŭre deĵoras antaŭ komputilo. Sed certe ni respondos kiel eble plej baldaŭ.

VENONTAJ KONGRESOJ.

- 5 - 11. oktobro **17-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo** en bela mediteranea urbo de Costa Brava (Klifa Marbordo) en Hispanio. Inf.: luis_serrano@mixmail.com

Kiel kutime, en nia sidejo vi trovos pliajn informojn pri la ĉi-supraj eventoj kaj, eventuale, eĉ kunvojaĝantoj.



Bjalistoko (Pollando). 94-a Universala Kongreso.
Iciar Arteche kaj Jesús M. García antaŭ la monumento al Zamenhof.

100 JAROJN DE LA UK EN BARCELONO.

La pasintan 30an Aprilo, en "Saló de Croniques" de la **barcelona** urbodomo, okazis solenaĵo memore al la Universala Kongreso de la jaro 1909 kaj samtempa vizito de D-ro Zamenhof al la urbo. Partoprenis KEA kaj HEF (Pedro Hernández). La grupo "Kaj Tiel Plu" kantis en la balo okazinta en la "placo de la Reĝo". Ankaŭ okazis promenado tra la malnova Barcelono, dum kiu fakulo klarigis kia estis vivo en 1909, ankaŭ pri la tiama UK, kaj pri la tiel nomata "Tragika Semajno"; oni okazigis veturadon ĝis la tombejaro de Montjuic por fari floran oferdonon en la tombo de Francesc Ferrer i Guardia; ankaŭ estis vizito al Fossar de la Pedrera kaj klarigoj pri la historio de la ĉ. 4000 entombigitoj tie (internaciaj brigadistoj kaj persekutitoj de la diktaturo).

("Nia Voĉo", organo de Madrida E-Liceo. Junio 2009)

H.E.F.

DEĴORADO ĈE LA HEF-Oficejo.

Sabate, de 11,00 ĝis 13,00, deĵoras Miguel, estrarano pri HEJS.

ĴURNALELTONDAĴOJ JAM EN LA HEF-PAĜARO.

En antaŭa mesaĝo mi diris ke la fako "Ĵurnal-eltondaĵoj" de la paĝaro de HEF estas en konstruado. Tio estas vera, sed fakte jam oni povas vidi tie konsiderindan nombron da ĵurnalaj eltondaĵoj ekde la jaro 1911 ĝis la nuntempo.

Lupe Sanz skanis multajn paperajn eltondaĵojn kiuj aperas en tiu fako. Ankaŭ aperas eltondaĵoj el retaj ĵurnaloj. Ĝuu tiun mirindaĵon en:
http://www.esperanto.es/hef/index.php?option=com_wrapper&view=wrapper&Itemid=272
kliku sur "Serĉi"

(Darío Rodríguez. Madrido. 26/05/2009)

DIVERSAĴOJ.

- En junio, la esperanta grupo de Gijón, **Astura Esperanta Asocio**, fariĝis centjara. La venonta numero de "Heleco" priraportos historion de la asocio. Konsultu ĉe http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino.
- Vizito de Osmo Buller, Ĝenerala Sekretario de UEA: Ene de la komerca programo de la Urbodoma Palaco pri Kongresoj de la Madrida Urbodomo, HEF ricevis inviton por organizi ontan **Universalan Kongreson en Madrido.**
- EKSTERORDINARA KUNVENO DUM LA HISPANA KONGRESO EN MALAGO.
  La nombro de membroj de HEF malpliiĝis je 50 dum unu jaro kaj duono.
  La Asembleo aprobis programon de aktivaĵoj kaj buĝeto por 2009-2010.
  Augusto Casquero estis nomumita Komitatano A, li reprezentos al HEF en UEA.
  Post la demisio de la **Prezidanto,** elektita pasintjare, dum la Eksterordinara Kunsido okazinta en Kuenko, oni aprobis ke la vic-prezidanto **Pedro Hernandez,** iĝos Prezidanto ĝis la fino de la mandato de la nuna estraro. Provizore, ne estos vicprezidanto.

("Nia Voĉo", organo de Madrida E-Liceo. Junio 2009)

La sidejo de Hispana Esperanta Federacio preskaŭ brulis!

Okazis brulego frumatene la pasintan 29an de julio. Temis pri provokita brulego en la oficejo 3 de la dua etaĝo (ĝi estas oficejo de ekstremdekstra junulara organizo). La HEF oficejo estas en la tria etaĝo. La brulego provokis grandan damaĝon en kelkaj oficejoj kaj en la dua etaĝo mem, sed ĝi feliĉe ne atingis la trian . Tamen la tria estas tute fumita, kvankam la HEF-oficejo estas tute sendamaĝa interne, la pordo estas makulita per fumo.

Do, preskaŭ okazis katastrofo: kvankam la HEF-oficejo havas asekuron, kaj la informon de la komputiloj preskaŭ semajne estas kopiata por havi ĝin ekstere, la Biblioteko estas tute neanstataŭebla.

TRA LA MONDO ...

Hispana kandidato por la Eŭropa Parlamento preferas plurlingvan solvon: la hispana tuj post la angla!

Jen artikolo laŭ kiu la hispana kandidato por la Eŭropa Parlamento Jaime Mayor Oreja volas labori por ke la hispana estu unu de la ĉefaj lingvoj de la komunumo tuj post la angla. Strange, en mia naskiĝlando multaj politikistoj pensas simile, sed la plej multaj el ili preferas la germanan tuj post la angla. Amike, Martin

http://ecodiario.eleconomista.es/espana/noticias/1245763/05/09/Mayor-oreja-dice-que-el-catalan-tiene-que-ser-defendido-en-cataluna-no-en-la-union-europea.html

BARCELONA, 14 (SERVIMEDIA) El candidato del PP en las elecciones al Parlamento Europeo, Jaime Mayor Oreja, afirmó hoy en Barcelona que "el catalán tiene que ser defendido en Cataluña" y no en la Unión Europea, donde "se debe trabajar ahora por que el español sea de las primeras lenguas de comunicación después del inglés".

Durante su participación en el "Fórum Europa. Tribuna Catalunya", organizado por Nueva Economía Fórum, Mayor fue preguntado por sus polémicas declaraciones del pasado fin de semana, cuando dijo que la inmersión lingüística es "una inmersión en la ignorancia" y acusó a la Generalitat de Cataluña de "despreciar" la libertad de los padres con medidas "sin precedentes".

El candidato popular puntualizó hoy que "la única solución en la Unión Europea es que los europeos dominen dos o tres lenguas, y el gran debate que tenemos en el futuro de la UE es de qué forma podemos conseguir que el español sea la otra gran lengua de comunicación europea, además del inglés".

El ex ministro del Interior remarcó que "en Europa tenemos veinte idiomas oficiales y en cada reunión de la presidencia del Grupo Popular Europeo tenemos un equipo de veinte intérpretes. ¡Imagínese que llevamos otras lenguas!", dijo.

"Lo que tenemos que conseguir es que los europeos nos pudiésemos comunicar con una, dos o tres lenguas, y no hablo del esperanto", agregó.

(15/05/2009. Per retpoŝto)

UEA LANĈIS RETAN FILMĴURNALON.

La 15-an de majo 1998 estis dissendita la unua numero de Gazetaraj Komunikoj de UEA. Precize 11 jarojn poste la populara novaĵservo ricevis aŭdvidan kunulon, kiu nomiĝas "UEA viva". Temas pri 10-minuta filmĵurnalo en YouTube kun mallongaj raportetoj pri aktualaĵoj en la vivo de UEA kaj TEJO kaj de la Centra Oficejo. Ĉiufoje oni prezentas ankaŭ novaĵon en la Libroservo. Komence oni planas prepari "UEA viva" kun intervaloj de unu-du semajnoj. Gazetaraj Komunikoj plu aperos kiel antaŭe.

La lanĉo de la reta ĵurnalo "UEA viva" estas nova paŝo en la plivastiĝanta utiligo de modernaj komunikrimedoj en la agado de UEA, kiun antaŭvidis la Strategia Laborplano de la Asocio. Komence de majo UEA funkciigis retan kinejon en Ipernity, kie jam estas videblaj ok filmoj pri la programeroj de la aprila Malferma Tago kaj du historiaj dokumentoj pri la unua IJK en 1938 kaj pri IJK kaj UK en 1959. Iom post iom la kolekto de la reta kinejo estos plivastigata per aliaj filmoj. La ĵurnalo "UEA viva" trovigxas en:

http://www.youtube.com/UEAviva
La reta kinejo troviĝas en http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video

Por aŭtomata senpaga ricevado de Gazetaraj Komunikoj oni povas registriĝi kiel abonanto ĉe http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/index.html

(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 327. 2009-05-15)

FERNANDO SAVATER MENCIAS ESPERANTON.

En la ĵurnalo "El País" aperis artikolo de Fernando Savater kies surskribo estas: "Lamento por Babel".

La sinjoro Savater diras: "En cuanto al esperanto, pese a su ingeniosa y racional construcción, no cabe sino certificar su fracaso. Sólo un indudable éxito se apuntó su creador, el industrioso doctor Zamenhof. A comienzos del pasado siglo, una empresa americana que se disponía a patentar la primera cámara fotográfica portátil le pidió un nombre para su producto que fuese igualmente eufónico en cualquier lengua. Y Zamenhof acuñó la única palabra de esperanto que todos hemos pronunciado alguna vez: kodak."

(El retpoŝto. 26/05/2009)

Dankon pro la atentigo. Tamen, en tiaj okazaĵoj, konvenas aldoni la ligilon al la koncerna artikolo por ke interesatoj tuj iru mem kontroli:
http://www.elpais.com/articulo/cultura/Lamento/Babel/elpepucul/20090526elpepicul_7/Tes
(se la ligilo rompiĝas jen mallongigo: http://lost.in/Vd)

"*Y Zamenhof acuñó la única palabra de esperanto que todos hemos pronunciado alguna vez: kodak*."

Krom aliaj konsideroj, indus atentigi S-ron Savater ke tiu aserto estas malvera: kodak ne estas esperanta vorto, kaj tre dubinde Zamenhof povus konsili al S-ro Eastman pri tiu afero.

(Manolo Pancorbo. 26/05/2009)

La vorton Kodak mem elpensis la kreinto de tiu fotilo, George Eastman. Mi ege dubas ke li estus konsultinta tion al Zamenhof: tio estas fantaziajo de la artikolisto.

Jen vortoj de George Eastman pri la nomo de li donita al sia fotilo:

"I devised the name myself. The letter "K" had been a favorite with me -- it seems a strong, incisive sort of letter. It became a question of trying out a great number of combinations of letters that made words starting and ending with 'K.' The word 'Kodak' is the result." (http://www.kodak.com/US/en/corp/kodakHistory/eastmanTheMan.shtml)

"Kodako" aperas en Plena Ilustrita Vortaro (PIV) kiel difino de rapida fotilo. Sed tiu vorto nur aperis en tiu E-vortaro kelkajn jardekojn post la apero de tiu masineto.

Estis diskuto en soc.culture.esperanto antaŭ kelkaj jaroj rilate al Kodak:
http://groups.google.es/group/soc.culture.esperanto/search?hl=eo&group=soc.culture.esperanto&q=kodak&qt_g=Buscar+en+este+grupo

(Darío Rodríguez. 26/05/2009)

Tiu vere trafa varbado al esperanto.

Printempas. Hieraŭ kolego, kunlaboranto mia, estis tre amorema. En senespera provo trovi homan specimenon, kun kiu seksumi, li demandis al mi, kiel oni diras esperante "mi venis ĉi tien por sekso". Tio ŝajnis tiam tro evidenta al li, kaj mi proponis "por amoro". Tio daŭre estis tro obscena al li, kaj mi ankoraŭ proponis "mi venis ĉi tien por serĉi inojn".

Tio plaĉis al li. Li eĉ tre rapide serĉis tradukilon (unua paŝo liaparte) kaj riproĉis al mi, ke "ino" ne estis rekonata de tiu tradukilo. Mi devis klarigi al li, ke laŭ ekstrema fundamentismo tio ja ne pravas, ĉar tio slangas. Ni korektis la frazon al "knabinojn" (kvankam mi nur pensas, ke laŭ la esperanteca pens-strukturo, oni amoras kun virinoj kaj ne kun knabinoj [almenaŭ laŭleĝe], dum en hispana "chica" havas plurajn signifojn).

La miraklo ne atendus longe alveni. Amikino lia demandis al li, kio damne tio estis. Li klarigis, kaj li ne volis esti malpli. Do ili esploris pri la malina vorto. Rapide ili trovis "knabojn". Tio eĉ speciale plaĉis al ŝi, ĉar ĝuste hispanajn "nabojn" estis tio, kion ŝi serĉis.

Ŝajne aliaj geamikoj iliaj interesiĝis pri tiu ne-klara kaj ekzota maniero,kaj aliaj faris tion.

Kiom da fortoj malŝparitaj, provante montri aspektojn de esperanto kiuj estas plene seninteresaj!! Jen la internacia komunikil'!

(Raúl Salinas Monteagudo. Per retpoŝto. 29/05/2009)

KANTISTINO DE "EUROVISION" UZAS ESPERANTON.

42 landoj partoprenis la pasintan eŭropan kanzonkonkurson nomatan "**Eurovision**". Unu kantistino, Patricia Kaas, el Francio, kantanta en la franca, ne nur kontraŭstaras la tendencon kanti en la angla lingvo, sed ŝi metis Esperantan tekston de sia kanzono en sian retpaĝaron.

(Nia Voĉo. Organo de Madrida E-Liceo. Junio 2009)

Reage al la vandaĵoj en Bjalistoko.

Responde al la raportoj pri vandalaj atakoj kontraŭ la monumento de Zamenhof kaj kontraŭ la Esperanto-kongreso en Bjalistoko, vidu http://www.liberafolio.org/ , sub la titolo "Verdaj kaj bluaj steloj en Bjalistoko"

(Amri Wandel. Israelio. 13/08/2009)

ALTNIVELA AKCEPTO POR LA DELEGITARO DE UEA ĈE UNESKO.

Tripersona delegitaro de UEA estis tre varme akceptita en Unesko la 8-an de junio. Ĝi konsistis el la konstantaj Unesko-reprezentantoj de UEA, Barbara Despiney kaj François Lo Jacomo, kaj el eksprezidanto Renato Corsetti. Antaŭ la vizito prezidanto Probal Dasgupta sendis al Unesko detalan raporton pri la kontribuo de UEA al la Internacia Jaro de Lingvoj en 2008. La temaro de la Jaro estis multmaniere pritraktata en UEA kaj ĝiaj landaj asocioj. La plej pintaj kulminoj en tio estis la 93-a UK en Roterdamo en julio, kies kongresa temo kombinis la Jaron de Lingvoj kun la 100-jariĝo de UEA, kaj la

konferenco en la Pariza sidejo de Unesko en decembro, kiu samtempe fermis la Jaron de Lingvoj kaj malfermis la Zamenhof-jaron.

La delegitaro de UEA estis unue akceptita de la programspecialisto Mauro Rosi. Montriĝis, ke li funde pristudis la dosieron de UEA, komisiite de s-ino Françoise Rivière, asista ĝenerala direktoro pri kulturo, al kiu ĝi estis direktita. Post preparaj diskutoj kun Rosi, la reprezentantoj de UEA estis akceptitaj de s-ino Rivière mem. Rosi resumis al la asista ĝenerala direktorino la raporton de UEA, ne forgesante elstarigi la rapidecon kaj efikecon, kun kiuj UEA organizis tradukadon de la inaŭgura mesaĝo de la ĝenerala direktoro de Unesko pri la Lingvojaro al kvardeko da lingvoj pere de Esperanto.

Dum la renkontiĝo kun s-ino Rivière la reprezentantoj de UEA prezentis al ŝi ankaŭ la proponon de UEA, ke la Jaro de Lingvoj ricevu daŭrigon en formo de Internacia Jardeko de Lingvoj. La asista ĝenerala direktorino trovis la ideon tre interesa, ne laste pro tio, ke laŭ ŝi la Kultura Fako de Unesko estas nun pli ol antaŭe premata por agi favore al lingvoj. Dum la lasta parto de la renkontiĝo oni diskutis pri la eblecoj kaj la plej sekvinda vojo por antaŭenigi la ideon pri la Jardeko. En Unesko, pri deklaro de temaj jaroj kaj jardekoj, kompetentas la Ĝenerala Konferenco, al kiu nur la membroj-ŝtatoj rajtas fari proponojn. Sekve necesos silenta diplomatio kaj premagado por akiri la subtenon de sufiĉa nombro da ŝtatoj kaj por persvadi ilin fari proponon. La sekva Ĝenerala Konferenco, al kiu eblus sumeti ĝin, estos en oktobro 2011. Sukceso tie povus do signifi, ke la Jardeko de Lingvoj daŭrus de 2012 gxis 2021.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 329. 2009-06-09).

SOCIARO DE UEA.

En 2008 **UEA** registris la plej malgrandan nombron da individuaj membroj: 5.702. La tuta membraro tamen kreskis per 706 ĉar la aliĝintaj membroj (tiuj anoj de la landaj asocioj kiuj ne estas individuaj membroj) plimultiĝis al 12.492.

(Nia Voĉo. Organo de Madrida E-Liceo. Julio/Aŭgusto 2009)

NOVA E-POŜTMARKO.

"Cent jaroj de UEA" estas la titolo de poŝtmarko eldonita en Bosnio-Hercegovino en la eldonkvanto de 30 mil ekz-oj.

(Nia Voĉo. Organo de Madrida E-Liceo. Julio/Aŭgusto 2009)

BALOTO POR LA EU PARLAMENTO. LA ESPERANTA PARTIO.

La esperanta partio ricevis en Germanio sume 11.859 voĉdonojn kaj en Francio 29.263. Krome, estis reelektita Małgorzata Handzlik, kandidatino de la granda pola partio Civitana Platformo; tamen, Ludmila Novak, el Slovenio, ne ricevis sufiĉe da voĉdonoj.

(Nia Voĉo. Organo de Madrida E-Liceo. Julio/Aŭgusto 2009)

MICHAEL JACKSON KAJ ESPERANTO.

Michael Jackson estis tiel genia ke li uzis esperanton en unu el siaj videoj.
http://www.soitu.es/participacion/2009/06/29/u/tonyo_1246227341.html

(Nia Voĉo. Organo de Madrida E-Liceo. Julio/Aŭgusto 2009)